



«LE GROUPE ESPERANTO DU MAINE» SALUTAS VIN!



Bonvenigaj vortoj

"Malboneco de malvirtuloj ne timigas min, sed indiferenteco de bonuloj ja timigas min"

Martin Luther King

Enhavo

Literature paĝo	p.1
80-a datreveno de Hiroŝima (1-a parto)	p.2.3
Homaj Rajtoj	p.4

MARTIN NIEMÖLLER, (1892-1984) estis protestanta pastro kaj aktivulo kontraŭ antisemitismo en Germanio. Li estis arestita en 1937 pro "atakado de la ŝtato". Li estis malliberigita dum ok monatoj antaŭ esti sendita al la Sachsenhausen koncentrejo, tiam al Dachau, kie li restis internigita ĝis 1945.

*"Kiam ili venis por la komunistoj,
mi ne protestis ĉar mi ne estas komunisto.*

*Kiam ili venis por la judoj,
mi ne protestis ĉar mi ne estas judo.*

*Kiam ili venis por la sindikatanoj,
mi ne protestis ĉar mi ne estas sindikatano.*

*Kiam ili venis por la katolikoj,
mi ne protestis ĉar mi ne estas katoliko.*

Kaj kiam ili venis por mi, restis neniuj por protesti."

MARTIN NIEMÖLLER, 1946

Eliza Orzeszkowa

Pola verkistino (1841-1910)




MARTA

Tradukis
L.L.
Zamenhof

La Interrompita Kanto

Tradukis
Kazimierz Bein
(Kabe)




Bona Sinjorino

Tradukis
Kazimierz Bein
(Kabe)



Ĉe Nemano

Tradukis
Tomasz Chmielik





Eliza Orzeszkowa

Eliza Oĵeŝkova

Eliza Orzeszkowa naskiĝis Paŭłowska, la 6-an de junio 1841 en Miłkowszczyzna (nuntempe en Belorusio) kaj mortis la 18-an de majo 1910 en Grodno (hodiaŭ Hrodno, Belorusio).

Ŝi naskiĝis en nobela familio kaj edziniĝis je la aĝo de 17 jaroj kun la bienulo Piotr Orzeszko. Oni senvalidigis la geedzecon post 11 jaroj kaj ŝi ekloĝis en Grodno. Ŝi edziniĝis denove en 1894, sed la dua edzo mortis post du jaroj.

Ŝi estis pola romanverkisto asociita kun pozitivismo, filozofia movado lanĉita en la 19-a jarcento de Auguste Comte.

Ŝi estas konata pro sia sinteno favore al virina emancipiĝo. En sia laboro, ŝi traktas la sociajn kondiĉojn de sia okupata lando, rezolute kun la malfortuloj kaj premataj: virinoj, kamparanoj kaj judoj. S-ino Orzeszkowa estis unu el la unuaj polaj virinoj kiuj parolis publike pri emancipiĝo.

En Esperantujo, interaliaj, ŝi estas konata kiel la aŭtorino de Marta. La romanon esperantigis Louis-Lazare Zamenhof, kies traduko estis ankaŭ tradukita al la japana. Tial tiu romano estis vaste legata en japanaj lernejoj kiel eduka legaĵo.

En sia eseo "A Few Words About Women" (1870), kaj poste la romanoj Marthe (1873), Sinjoro Graba (Pan Graba, 1872) kaj Marta (1877), ŝi postulis edukadon por virinoj, kiu certigus ilian sendependecon kaj la eblon gajni porvivaĵon, denuncante la sennombrajn obstaklojn renkontitajn de sola virino kun infanoj.

Eliza Orzeszkowa ankaŭ estas tre sentema pri la temo de pola sendependeco. En 1880, ŝi skribis artikolon titolitan Patriotismo kaj Kosmopolitismo en kiu ŝi klarigis ke amo al sia lando konsistas el amo de la spiritaj bonoj de sia popolo. Ŝia patriotismo havas nenion komunan kun mallarĝa naciismo.

En 1905 Eliza Orzeszkowa, Henryk Sienkiewicz kaj Leo Tolstoj estis nomumitaj kiel kandidatoj por la Nobel-premio pri literaturo. La premion ricevis Henry Sienkiewicz (aŭtoro de "Quo Vadis").

80-a datreveno de Hiroŝima 06/08/1945- 06/08/2025

Toyofumi Ogura estas japana verkisto kiu elvokis en sia romano *Leteroj ek la fino de la mondo* la unua tago post la eksplodo de la atombombo kiam li serĉis sian edzinon en ilia urbo Hiroŝima. Osegura akceptis la esperantan version kiu prezentas resumon de sia romano *titolita Kun la Kadavro de l'Edzino*. Jen la unua parto.



*Aera vido de
de Hiroŝima en
septembro
1945 Max*

Desfor/AP/SIPA

La Momento

Denove venas la 6-a tago de aŭgusto.

Tiu antaŭsento estas netolerebla por mi. De tiam jam pasis 5 jaroj. Tamen por mi ankoraŭ tio estas netolerebla.

15 minutojn post la 8-a matene!

Tiu horo regule venanta unufojon en ĉiu tago kaj la pozicio de montriloj de horloĝo ĉe tiu horo. Eĉ tio estas netolerebla por mi. De tempo al tempo, kiam hazarde miaj okuloj renkontas montrilojn ĉe tiu horo, mia koro frostiĝas.

En tiu momento mi estis sur strato 4 kilometrojn for oriente de la “eksplodcentro”. Tiam mi estis sur revenvojo de frumatena okupo.

Estis serena mateno. Fulmobrilo grandega kvazaŭ magnezio ekbruliĝinta, plene en la ĉielo!

Mi reflekse ĵetis min surventre sur straton. Samtempe kun la fulmo, ŝajne, mi sentis varmegon sur mia tuta haŭto.

Tempa malpleno regata de absoluta silento.

Post kelkaj sekundoj - ----supozeble “kelkaj sekundoj”,

mi ne scias precize - tondris vastega granda bruoj:

d-o-o-ng. Samtempe fortega ventopremo subpremis min, la tutan korpon.

Ree tempa malpleno regata de absoluta silento. Intertempe komplikitaj diversspecaj “detrubruoj” okazis en mia tuta ĉirkaŭaĵo - mi sentis.

Mia konscio : ne estis perdita. Sur mia korpo troviĝis nek vundo nek brulvundo.

Mi levis la kapon. Mia vizaĝo frontis okcidenten al la urbo Hiroŝima. En la somera ĉielo brilanta malhelblue ŝveladas bulkoj da grandega blanka nubo.

Tio vastiĝas pli kaj pli - supreniras kun granda rapideco. Ties supra parto formiĝas kvavaŭ ĉapelo de fungo. La malsupra parto estas piedo de fungo, aŭ pli ĝuste, vosto de trombo. Kaj de la malsupro bulkoj da nubo sinsekve elfluas jupren kaj etendiĝas flanken. Grandioza “altebenajo de nuboj”. Plie ĝi moviĝas senĉese. ŝanĝiĝas ĝiaj formo, koloro kaj lumo. “Paradprezentado de nuboj kaj lumo” senfine ŝanĝiganta sur la scenejo de l’granda ĉielo.

Mi trovis min stariginta.

“Bombo?”

“Flambombo?”

“Hommortiga radio?”

“Eksplodo de pulvejo?”

Mi rapide foliumis paĝojn de “primilitaj scioj” en mia kapo. Sed vane. Neniu paĝo trafis la celon.

Post nelonge min alparolis persono, ŝajne kamparano loĝanta proksime. Li atestis ke li vidis 3 B 29-ojn venintaj. Sed mi ne povis kredi tion, ĉar mi ne rimarkis eĉ ilian bruon. Mi perdis ĉiun rimedon por prikonjekti

Ĉirkaŭ kilometron de la loko, proksime al urbo Hiroŝima, staras la domo de mia plijuna fratino. Mi apenaŭ rememoris tion. Mi decidis ke antaŭ ĉio mi iru tien kun antaŭvido ke iom klariĝos la vera stato, se mi pli proksimiĝos al la urbo.

La vojo estis nova, larĝa kaj rekta al la urbo. En ĝiaj ambaŭ flankoj estis domoj dise. Tiam mi tute neatentis faktojn pri detruoj de tegmentoj, disrompoj de fenestrovitroj k. a. de la domoj. Mi nur renkontis de tempo al tempo sangomakulitajn virojn kaj virinojn elportatajn el ili.

“Sed, doloras ...”

“Kio okazis?”

“Pro vitroj...”

Nur tiaj simplaj interparoloj donis al mi nenian komprenigon. Sed laŭ mia proksimiĝo al la urbo kaj densiĝo de domoj ambaŭflanke de la vojo plorvoĉoj de infanoj, koleraĵoj voĉoj de viroj, vekrioj de virinoj k. s. sinsekve enfrapis miajn orelojn el domoj :

“Ve, doloras...”

“Panjo!”

“Kie drogokesto?”

“...bandaĝon !”

Kaj tio vole nevole igis min imagi terurajn scenojn en domoj en vicoj.

Mia atento transiris al surteraj okazaĵoj de la “paradprezentado de nuboj”. Tie sin trovis malrapide moviĝantaj procesioj de monstre groteskaj homoj - procesioj malorde paŝantaj de la urbo kontraŭ min.

Viro ŝovanta biciklon kun kurbigitaj teniloj. Virino kun nudaj femuroj sub ŝirita *monpei*¹. Viroj kaj virinoj portantaj eŭropajn au japanajn vestojn, bruldifektitajn strange ĉifone. Nudpiedaj, kun *getao*² sur nur unu piedo; vizaĝo ŝvelanta en duonflanko; sangogutantaj manoj, piedoj

¹ Kalsonsimila laborvesto por virino. Noto de trad.

² Japana sandalo el ligno. Noto de trad.

UNIVERSALA DEKLARACIO DE LA HOMAJ RAJTOJ

Adoptita kaj proklamita de Rezolucio 217 A (III) de la Ĝenerala Asembleo, 10^{an} de decembro 1948

Artikolo 10

Ĉiu en plena egaleco rajtas je justa kaj publika proceso antaŭ sendependa kaj senpartia tribunalo, por prijuĝo de liaj rajtoj kaj devoj kaj de kiu ajn kriminala akuzo kontraŭ li.

Artikolo 11

Ĉiu akuzita pro punebla faro rajtas, ke oni supozu lin senkulpa, ĝis oni pruvos laŭleĝe lian kulpon en publika proceso, en kiu li ricevis ĉiujn garantiojn necesajn por sia defendo.

Neniu estu konsiderata krimkulpa pro kia ajn ago aŭ neago, kiu ne konsistigis puneblan faron, laŭ nacia aŭ internacia juro, en la tempo, kiam ĝi estis farita. Same tiel, ne estu aljuĝita pli severa puno ol tiu, kiu estis aplikebla en la tempo, kiam la punebla faro estis plenumita.



La teksto de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj disponeblas ĉe la [retejo de Unuiĝintaj Nacioj](#).



Ĵomart kaj Nataŝa

MILITO

Io ne ĝustas en mondo
Plagoj venadas en ondoj
Nia planedo estas graveda
Je milito.

Kovras fumego ĉielon
Lasis nin ĉiujn anĝeloj
Noktoj malvarmaj
Preĝoj kaj larmoj
Sango kaj ŝvito.

Io ne ĝustas, mi sentas
Mankas al mondo prudento
Ja ĉiam homa genio
Inventas potencajn armilojn.

Milito milito
Post longa nokt' mateniĝas
Multaj neniam vekigōs
Kontraŭ la bomboj staras
l' kolombo. Helpu nin dio.
Kielel eta infano
Kreskas kruela tirano ?
Io ne ĝustas Io ne justas
Hom-tragedio.

Io ne ĝustas, amiko
Ja malsukcesas politiko
Ja oni bombas denove
Ja oni murdas denove Milito.
Milito milito.

Fajroj ĉe la horizonto
Venas novaĵoj de l' fronto
La dudek kvaran de februaro
Ekis l' frenezo.

Koro vundita por ĉiam
Kaj mi forgesos neniam
Ŝtat' kontraŭ ŝtato
Frat' kontraŭ frato.
Homoj civilaj kaj kruelaj soldatoj Terura prezo :
Mariupol Herson Hostomel
Melitopol Berdjansk Ĉerniĥiv
Harkiv Sumi Izjum
Irpinj Kijiv Buĉa
Varsovio Vilno Rigo
Talino Bukareŝto Londono
Romo Parizo Berlino.